


Programo de KKPS

Horo	Granda salono	Malgranda salono	Ĉambro 1	Ĉambro 2	
Vendredo					
14:00	Akceptiĝo	Klaĉado	Esperantigo de la ejo		
19:00	Vespermanĝo				
20:30	Generacia kvizo	Trinkejo			
22:00	Dancejo				
Sabato					
8:30	Matenmanĝo				
9:30	Preparoj balo	TEJO-trejnado	Bierfarado en kuirejo	Kurso Komencanto	Kurso Komenconto
10:30	Kurso Progresanto				
11:30				NEJ-sembleo	
12:30	Tagmanĝo				
14:00	10 faktoj pri BE	TEJO-trejnado	Bierfarado en kuirejo	Kurso Komencanto	Kurso Komenconto
15:00	Demokratio Irano				
16:00	Vitraĵoj			Ĝemelaj urboj	Slovaka literaturo
18:00	Preparoj balo	BEMI-prezento	Mondaj heredaĵoj		
18:00	Vespermanĝo				
20:00	Halovena balo	Trinkejo			
22:00	Dancejo				
Dimanĉo					
8:30	Matenmanĝo				
9:30	La verdaj skoltoj	TEJO-trejnado	Kurso Progresanto		
11:00		TEJO-trejnado			
12:00	Tagmanĝo		Ekskurso al Maastricht		



Pos-Amiko

Aŭtuno 2015, Numero 14

Pensu pri aliaj homoj, pludonu la gazeton!

INDEKSO:

1. Esperantistoj ŝatas bieron
2. Klimatkomisiono volas malpermesi Esperanton
2. Bariloj ĉirkaŭ Hungarujo: kiel alveni al JES?
2. TEJO: trajni, trinki trejni?
3. Statutŝanĝo de TEJO eble enhavos plisimpligon de elektaj proceduroj
3. Horoskopo
4. EVENTOJ

KOLOFONO

Pos-Amiko estas eldonaĵo de NEJ kaj aperas kvarfoje jare.

Redaktoro: Koko Poso

kkps.klackunveno@gmail.com

<http://kkps-klacxkunveno.wikidot.com/Pos-Amiko>

[wikidot.com/Pos-Amiko](http://kkps-klacxkunveno.wikidot.com/Pos-Amiko)

Esperantistoj ŝatas bieron

La pasio de Esperantistoj por biero estas konata fakto, specife inter kongresaj trinkejestroj. Sed lastatempe la pasio montriĝis en nova formo: veraj Esperantistaj bierfarejoj! En majo V. Doumont prezentis (kaj vendis) al la mondo sian 'Pekan Bieron', kaj en junio aperis paĝo de '1-a esperanta bierfarejo'. Krome jam de kelkaj jaroj la praga klubo E-mental organizas renkontiĝon BIER-o, kaj la eksprezidanto de TEJO denove fervore kreas hejme proprajn bierojn. Ĉi ĉio ŝajnas pli ol nur hazardo, kaj bone informitaj fontoj diras, ke la estraro de TEJO planas starigon de biera faka sekcio kaj kreadon de esperanta vikio pri bieroj.



Biero ankaŭ estas la nova financa strategio de la Verdaj Skoltoj.

Plendoj ankaŭ aperis: unue de abstinuloj, kaj poste pli serioze de la gepatroj de la Verdaj Skoltoj, grupo de adoleskoj sub la respondecado de V. Doumont. Kelkaj el la adoleskoj eĉ vendadis la bieron, kiun ili mem ne rajtis trinki! Krome iu germana denaskulo jam plendis pri manko de Esperantistaj senalkholaj bieroj, kaj M.

Ronco ŝatus baldaŭan aperon de E-biero sen glutenoj. Finfine kelkaj francaj maljunuloj daŭre esperas je la 'vina venko'.

Kun aŭ sen biero, la Pos-Amiko deziras al ĉiuj agrablan KKPS-on.

Klimatkomisiono volas malpermesi Esperanton

P. Lemiko, altranga sciencisto en la Interregistara Spertularo pri Klimata Ŝanĝiĝo (ISKS) proponis malpermeson de Esperanto kaj ĝenerale lernadon de fremdaj lingvoj, ĉar ili instigas al longdistancaj vojaĝoj, kiuj produktas amason da karbodioksido.

La propono tuj vekis la Esperanto-komunumon, inter alie la Civito tuj aprobis rezolucion, kaj IFEF kaj BEMI preparas komunan deklaron pri la rolo de Esperanto kontraŭ klimatsanĝo. Fine la organiza teamo de la Tutslovaka Esperanto-Renkontiĝo proponis kiel simbolan energiŝparan agon forŝalti la sonon dum la diskejo de DĴ Kunar.

La Unuiĝintaj Nacioj jam substrekis, ke temas nur pri opinio de individuo, ne de la interregistara organizo. P. Lemiko mem ne estis atingebla por reago, ĉar li estis en transoceana flugo al klimatkonferenco.

Bariloj ĉirkaŭ Hungarujo: kiel alveni al JES?

Organizantoj kaj aliĝintoj de JES zorgeme sekvas la novaĵojn el Hungarujo, kies registaro elpensas ĉiam pli ekstremajn metodojn por forbari eksterlandanojn. En septembro konstruiĝis granda barilo sur la landlimo kun Serbujo, en oktobro sekvis la barilo kun Kroatujo, kaj nun fermiĝas la slovena landlimo. Se la registaro tiel daŭrigos, antaŭ JES povus esti fermitaj ankoraŭ la landlimoj kun Aŭstrujo kaj Slovakujo. Krome la amasa fluo da migrantoj jam kelkfoje ŝtopis la trajnojn, ja la ĉefa vojaĝilo de Esperantistoj.

La organiza teamo ĝis nun asertas, ke alveno al la JES-ejo eblos, sed kelkaj esperantistoj jam kontaktis kelkajn homkontrabandistojn, kiuj pretus dum sia revenvojaĝo porti esperantistojn el Germanujo kaj Aŭstrujo al JES. Ekzistas eĉ onidiroj pri iu bicikla karavano en la vintro...

TEJO: trajni, trinki, trejni?

Aktivula trejnado estas ĉiam unu el la agadkampoj de TEJO, sed ŝajnas, ke en la lastaj jaroj trejnadoj kaj seminarioj okupiĝas pli kaj pli kernan lokon en la junulara movado. Neniu junulara renkontiĝo plu ŝajnas okazi sen la okazo de almenaŭ iu trejna aktivaĵo. Dum tiu ĉi KKPS eĉ okazos trejnado de trejnistoj! En ekskluziva intervjuo kun la Pos-Amiko, la nova komisiito pri Aktivula Trejnado de TEJO, Alex Escobedo, klarigas la situacion:

Poso: “Kial nun tiom da atento por aktivula trejnado?”

Escobedo: “Tio estas strategia elekto. Ni momente prokrastas la klopodojn por aperigi Esperanton en la eduksistemo, kaj anstataŭe aperigas eduksistemon en Esperanto.”

P: “Ĉu vi antaŭvidas konkurencon kun la Akademio Internacia de la Sciencoj, la Kongresa Universitato de UEA aŭ Edukado@Interreto?”

E: “Ne, niaj celgrupoj estas malsamaj. Ni substrekas trejnadon pri tuj aplikebaj lertoj kaj kapabloj, dum renkontiĝoj kie multaj junaj Esperantistoj ĉeestas.

P: “Ĉu ne simple temas nur pri senpagaj vojaĝoj al Esperanto-aranĝoj?”

E: “Ne, temas pri Esperantaj aranĝoj kiuj hazarde okazas ĉirkaŭ niaj trejnadoj. Ni fakte provis dum KKPS ankaŭ okazigi sesiojn vespere, sed bedaŭre la organizo ne permesis tion.”

Fidinda fonto informas, ke TEJO planas ŝanĝi sian nomon post la sendependiĝo al Trejna Edukada Junulara Organizo, ekde la 1-a de aprilo 2016.

Statutŝanĝo de TEJO eble enhavos plisimpligon de elektaj proceduroj

Michael Boris Mandirola: “Ekde 2016, regos tiu, kiu plej laŭte proponas.”

LA HOROSKOPO

Ŝafo: Iu erare pensos, ke via vestaĵo estas halovena kostumo.

Taŭro: Ne konfuziĝu, eblas vojaĝi sole per karavano.

Ĝemeloj: Finfine ĉio estas klara.

Kankro: Vi ne certas, al kiu generacio vi apartenas.

Leono: Vi malkovros, ke pli bonas biero ol papero.

Virgulino: Post bierfarado vi ne plu estos.

Pesilo: Vi estas en trejnsesio kaj pro tio vi ne legas tiun ĉi frazon.

Skorpio: Ne tuj iĝu komisiito nur ĉar la TEJO-estraro afable petos.

Kévin Morel-Fourrier: En okazo de dubo elektu la maldekstran.

Sagitario: Vi decidis nuligi vian turisman vojaĝon al Alepo.

Kaprikorno: Vi venkos.

Akvisto: Atentu ne akcidente kunporti Poŝ-Amikon anstataŭe!

Fiŝoj: Vi provas starigi landan sektion por ĝui rabaton.